

Heinrich Heine,

En admirinde bela  
maj'

*tradukita de Hans-Georg Kai-  
ser*

En admirinde bela maj',  
dum jam burĝonoj krevis,  
jen ankaŭ miakore  
la amo sin eklevis.

En admirinde bela maj',  
dum birdotril' senbridis,  
jen mi al ŝi sopirojn,  
dezirojn, ekkonfidis.

*Traduko de la Germana poemo  
“Im Mai” de HEINRICH HEINE  
(\*1797-12-13 – †1856-02-17)  
en Esperanton de HANS-GEORG  
KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

Arg-203-431 (2004-03-24  
07:33:04)

*La poemo troviĝas en la „Libro  
de la kantoj“, sekcio „Lirika  
intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.  
La traduko estas korektita laŭ la  
lasta ŝanĝo, kiun faris s-ro Hans-  
Georg Kaiser en 2004-03-21.*

Heinrich Heine,

En dolĉega Maj'

*tradukita de Friedrich Pillath*

Printempe en dolĉega Maj',  
Dum la burĝonoj krevis,  
El mia koro ĝerme  
Amsento sin eklevis.

Printempe en dolĉega Maj',  
Dum birda kanto sonis,  
De l' kora mi sopiro  
Konfeson al ŝi donis.

*Traduko de la Germana poemo “Im  
Mai” de HEINRICH HEINE (\*1797-  
12-13 – †1856-02-17) en Esperanton  
de FRIEDRICH PILLATH (†1932-  
04-03).*

Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)

*Tiu ĉi traduko aperis en Elek-  
titaj Poemoj, Berlin: Esperanto-  
Verlag Friedrich Ellersiek (2a el-  
dono), 1920, p. 13. La origi-  
na germana-lingva versio troviĝas  
en la „Libro de la kantoj“, sek-  
cio „Lirika intermezo“ (1822 -  
1823), n-ro I. Pri F. Pillath  
vidu ankaŭ la vikipedian rete-  
jon [http://eo.wikipedia.org/  
wiki/Friedrich\\_Pillath](http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath).*

Heinrich Heine,

En la mirida bela  
Maj'

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

En la mirinda bela Maj',  
dum sin burĝonoj fendis,  
en mia kor' la amon  
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela Maj',  
dum birda tril' ne ĉesis,  
al ŝi sopiron mian  
konfide mi konfessis.

*Traduko de la Germana poemo  
“Im Mai” de HEINRICH HEINE  
(\*1797-12-13 – †1856-02-  
17) en Esperanton de KÁLMÁN  
KALOCSAY (Kalmano Kaločajo,  
\*1911 – †1976).*

Arg-203-1082 (2010-05-26  
12:08:05)